



Enhavo

- VEKI sin – jen la eblo en aktiva preparo!
- VEKI – planeda pripenso, Lingva Festivalo
- VEKI – AMO-seminario ene
- VEKI – gastronomia rondo
- VEKI sin al klerigaj ebloj! ILEI vokas!
- UMEA konferencos virtuale

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-21 sendita el Budapeŝto, la 3an de majo

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

El la izoliĝo, indas sin VEKI !

Nia instruista Ligo levas sin al la defio! La fizika kongreso estas frue kaj inventeme transformita al perreta konferenco, kiu kovras preskaŭ ĉiujn tempozonojn de la terglobo.

**PROGRAMSKIZO de la 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco ILEI (VEKI)
25-31 julio 2020**

7 tagoj -- 7 temoj. Sekvos la pli preciza laŭtaga programa dismeto.

1. **Solena inaŭguro, prelegoj pri la kongresa temo. Planeda pripenso.**
2. **Pripensoj pri strukturo. Komitato**
3. **Prelegoj pri lingvoj. Lingva festivalo**
4. **Prelegoj pri interlingvistiko kaj Eo en universitatoj**
5. **Mastrumado de la Ligo. IPR, JA. Vivo de ILEI, demandoj kaj respondoj. Gastronomia rondo.**
6. **Pedagogiaj temoj. Instruspertoj**
7. **AMO – seminario. Internaciaj agadoj, internaciaj institucioj / Konkludo**

Anstataŭ Nacia Vespero ni havos **Planedan Pripenson**. La kutima frandvespero, kiu kutime malfermas la kunvenon de ILEI, havos taŭgan nomon : **gastronomia rondo** : filmu iun tipe tradician manĝon ĉe vi kun familianoj aŭ geamikoj kaj sendu ĝin al ILEI. Maksimuma daŭro : 3 – 5 minutoj. Nepre komencu dirante vian nomon, urbon kaj landon. Montru kaj nomu la manĝaĵon en via lingvo kaj en Eo, la manĝmanieron, komentu la manĝaĵojn, originon de ili, kuirmanieron... en kiu okazo

oni manĝas tion. Ni havos dum VEKI sesion, kie tiuj filmetoj sekvos unu la alian. Sendu ilin al Elena Nadikova uzante ilei.sekretario@gmail.com .

Koncertoj, deklamadoj : ni alvokas al artistoj, petante, ke ili sendu filmeton kun hejma koncerto por ILEI ĝis la 30-a de junio. Daŭro : inter 30 min kaj unu horo. Ni deziras havi en ĉiu sesio la lastan horon kun koncerto. Tio estas, ke ni devus akiri 30 kontribuojn. Ankaŭ povos esti koncertoj en rekta enreta partopreno ; por tio iu artisto aŭ artista grupo povas skribi al ilei.prezidanto@gmail.com, dirante : mi pretas ludi je tiu tago je tiu horo ! Bonvenon ! Pro tio ni ne havos Internacian Vesperon, ĉar ni ne vesperumos samtempe !

La temposkemo por la diversaj horzonoj.

Ĉiu tago havas sian **temon** kaj **tri sesiojn** ; la tago kongruas kun la tago en UTC + 2 (tio estas la Universala Tempo +2 horoj (CEST – konvena por Afriko kaj Eŭropo)

Tempoplano

UTC+2 NL CH de ES ĝis DE																															
01	02	03	04	05	06	07	08	09	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00								
Blua				Verda								Blua				Verda				Verda				Verda							
				Kalifornia sunsubiro												ĉefplado				Azia tagiĝo											
UTC + 9 JP KR																															
08	09	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00	01	02	03	04	05	06	07								
Blua			Verda											Blua			Verda											Verda			
UTC - 8 USA okcidento																															
14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00	01	02	03	04	05	06	07	08	09	10	11	12	13								
Blua			Verda											Blua			Verda											Verda			

Blua koloro = dormo, ripozo. Verda koloro: programeroj. Blanka au blua koloro: libera tempo por koridoraj babiladoj.

La **teknika aspekto** : La konferenco akiros kanalon alireblan per numero kaj pasvorto, kiun ni vaste komunikos antaŭe per nia retejo www.ilei.info.

Komenco : sabate la 25-an de julio, ĉefplado 15 :00 UTC + 2 : Solena inaŭguro.

Fino : vendrede la 31-an de julio, azia tagiĝo, 00 :00 UTC + 2 : Konkludo, adiaŭo.



Ni provos eldoni Konferencan Libron kun resumoj de la prezentaĵoj, filmoj, debatoj, decidoj. Ni faros magran eldonkvanton, tamen ni bezonas kelkajn ekzemplerojn por la bibliotekoj. Pro tio ILEI **alvokas al donacoj** por kovri tiujn kostojn kaj por kovri la kostojn de la reta agado.

La partopreno estos senpaga.

Konstanta informfluo okazas en la ĉefpaĝo de ILEI www.ilei.info

Same UMEA traniras al virtuala konferencado

UMEA decidis organizi la jam delonge planitan ĉi-jaran Internacian Medicinistan Esperanto-Kongresan (21-a IMEK) laŭ maniero de interreta Zom-konferenco. (*Zoom*)

La 21-a IMEK okazos la 17-an kaj 18-an de julio. La titolo de la kongreso estos „Pandemio KOVIM-19: historio, nuna stato kaj sekvoj“.

Laborlingvoj estos Esperanto kaj la angla.

Provizoran programon oni povas peti.

La kongreskotizo estas 15 € por partoprenantoj kaj gestudentoj, kiuj pretas prelegi, kaj 25 € por ĉiuj prelegantoj, kies prelegtekstoj ankaŭ aperos en aparta kongreslibro post la kongreso.

Por aliĝi, ni petas sendi retleteron kun poŝtadreso kaj telefonnumero al la estrino de la LKK, Katarina Faragó:

info.21aIMEK@gmail.com aŭ farago.kata@espmad.hu.

Ankaŭ demandojn pri la ĝenerala organizado, kongreskotizo k.t.p. ni petas senpere sendi al la LKK.

Prelegojn bv. anonci ĉe la estro de la scienca komitato, profesoro Vladimiro Opoka:
umea@interia.pl

Tekstoj estos akceptitaj en Esperanto, angla kaj hungara lingvo, laŭeble jam kun resumoj en Esperanto kaj/aŭ la angla.

Kompreneble vi rajtas dissendi ĉi tiujn informojn al viaj naciaj Esperanto-organizoj, gazetoj k.t.p.

Informojn vi trovos ankaŭ per <http://umea.fontoj.net/aktualajhoj>.

Christoph Klawe

Vortoj: 755

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.